

N I A V O Ĉ O

Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3°-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

JUNIO 2007

VORTARO "Amika"

Dum la Kongreso de Palos, Miguel G. Adúriz prezentos sian novan vortaron "Amika". Temas pri la aktualigita eldono de "Vortaro 2002". La vendokosto de la vortaro esperanto-hispana kaj inversa estos 12 eŭroj. Dum la kongreso la eldonisto ofertas ekde 10 ekzempleroj po 6,50 (petoj ĝis la 15an de junio kaj aĉeto en Palos), la alia oferto, ĝis la elĉerpiĝo de ekzempleroj estas skatolo kun 50 po 6,50 (ili estos senditaj senkoste)

URBESTRO DE MADRIDO, ESPERANTISTO

Toño del Barrio rememoras sian artikolon de "Boletín" numero 357 pri **Cayetano Redondo**, esperantisto kiu estis relative grava hispana politikisto: prezidanto de la socialista junularo, direktoro de la ĵurnalo "El Socialista", deputito en la unua respublikana Parlamento, kaj fine urbestro de Madrido. Li estis mortpafita tuj post la fino de la milito. La artikolon oni povas legi, esperante kaj hispane, ĉe :

<http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/redondo.htm>

<http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/cayetanoredondo.htm>

E-KURIOZAĴOJ

Aŭstria Ministerio pri Ekonomio kaj Laboro uzas esperanton en sia retejo *Pri Labor-inspekto*.

Stokholma restoracio Esperanto ricevis stelon en la gvidlibro Michelin. Ĝi estis taksita kiel unu el la tri plej bonaj en la lando.

La **ambasadorino de Litovio en Belgio**, kiu estas esperantistino, akceptis esti membro de la honora komitato de la 7a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio, okazonta ĉi-somere en Slovenio.

Aperis en Malago (la 15an de majo) kaj en Almerio (la 16an de majo) la lasta numero de la **universitata ĵurnalo AULA MAGNA**. La raportajon pri Esperanto kaj pri Andaluzia E-Asocio vi povas elŝuti per: http://rapidshare.com/files/32586709/Reportaje_Esperanto.pdf.html. Simila informado pri Esperanto aperos denove en la ĵurnalo Aula Magna (Granado, 22an majo kaj Jaeno, 23an majo).

La hispanlingva versio de la **parolado de Reinhard Selten** en la Eŭropa Parlamento, dum la Eŭropa Tago okazinta en majo, jam estas videbla en la paĝo de HEF, fako "Actualidad", subfako "Premio Nobel propones el esperanto":

http://www.esperanto.es/hefe/index.php?option=com_content&task=view&id=62&Itemid=86

Li partoprenis kune kun aliaj 13 Nobel-Premiitoj okaze de la 50-jariĝo de la Roma Traktato.

SENPROGRAMA RENKONTIĜO INTERNACIA TENDUMADO EN CALLOSA DE'N SARRIÀ (ALAKANTO) 16a ĝis 22a de Julio 2007

Kataluna Esperanto-Junularo kaj Valencia Esperanto-Junularo kune kun Varsovia Vento invitas ĉiujn esperantistojn ĝui internacian etoson, tendumi, festi, ripozi, plonĝi en la riveron, plaĝumi, ekskursi tra belaj pejzaĝoj, ktp. Estas antaŭplanitaj atelieroj pri valencia kulturo, kurso pri kataluna lingvo kaj intensiva esperantokurso por ne-esperantistoj. La plaĝo troviĝas 15 kilometrojn for.

La manĝojn kuiras surloke partoprenantoj mem. Ĉiutage oni kreas laborskupon zorganta pri aĉetado, kuirado kaj purigado; ĉiu partoprenanto aliĝu al tiu laborskipo almenaŭ unu tagon dum la tuta restado. Lokaj esperantistoj spertuloj pri komuna kuirado prizorgos la skipon. La menuoj baziĝos sur loka tradicia kuirarto kaj ankaŭ estos tre bongustaj vegetaranaj pladoj.

Portu vian tendon, dormosakon kaj matraceton. Muzikistoj portu viajn muzikilojn. Ne forgesu vian bankostumon.

Pliaj informoj kaj reta aliĝilo ĉe: http://www.esperanto.cat/spr/index_eo.html

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La sekretariino, Carmen Suárez, deĵoras lunde vespere (17,00-20,30h), dum aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es

Augusto Casquero, HEF-Prezidanto, restos en Ĉinio ĝis la fino de junio. Li instruas hispanan lingvon kaj kulturon pere de esperanto, same kiel li faris en Pollando.

La "Agencia Tributaria de Madrid" akceptis la peton de HEF, kiel asocio de publika utileco, tiel ke ĝi ne devos plu pagi la imposton por la doma propraĵo (IBI)

Informoj pri la programo, kotizo, hoteloj, ktp pri la Hispana Esperanto-Kongreso 2007

Palos (Huelva) ekde 5a ĝis la 8a de julio.

<http://kongreso.esperanto-andalucia.org>

<http://www.kongresoesperantoonubo.org/>

Provizora programo kaj aliĝilo:

<http://www.esperanto.es> > Esperanto > Kongreso 2007 aŭ rekte en:

http://www.esperanto.es/hefesperanto/index.php?option=com_content&task=view&id=25&Itemid=48

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

La konversacia-rondoj kiujn organizas Madrida Esperanto-Liceo okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

KURSOJ:

Vallecas. KOMENCOS EN OKTOBRO: Pedro Hernández organizas bazan kurson, sabate je la 17,00-a horo ĝis la 19,00h. Tel. 667 721 951 Loko: Librería Muga, Avda. Pablo Neruda, 89.

28038 Madrid. Ekzistas forumo por atingi senpage la materialon por la kurso, se vi deziras aliĝi, bv sendi mesaĝon al < esperantovallecas-subscribe@yahoogroups.com >

VENONTAJ KONGRESOJ

Universala Kongreso de Esperanto 2007. Yokohama (Japanio) 4a ĝis 11a Aŭgusto 2007

Hispana Esperanto-Kongreso. Palos (Huelva) kune kun Andaluzia E-Kongreso. 5a ĝis 8a Julio 2007

7-a Eŭropa Esperanto-Kongreso. Maribor (Slovenio) 28-a julio ĝis 4-a aŭgusto 2007

15a Internacia Esperanto-semajno de la Kulturo kaj Turismo. Tossa de Mar (Girono) 29 Sep / 6 Okt.

6-aj Someraj Dialogoj. Monistrol de Montserrat (Barcelona) 8 kaj 9 Septembro 2007.

NOVA LIBRO DE JORGE CAMACHO

Jorge Camacho ĵus aperigis novan poem-libron en la nederlanda eldonejo Bero, laŭ titolo "Eklipsas".

Vidu recenzon en : <http://www.liberafolio.org/2007/eklipsas>

La kotizo de MEL por la jaro 2007 estas 12,00 eŭroj

VI povas pagi la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3º-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid, Banco Sabadell/Atlántico konto

0081 7110 98 0001266730

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Asociación de Utilidad Pública Municipal

San Alejandro 6- 4ºB EXT

28005 Madrid